

INTERNACIA LERNEJA ESPERANTO-REVUO

SUB AŬSPICIO DE ILEI

APRILIO 1975



2-A JARO N-ro 3 (6)

Memore al la 30-a dat'reveno de la 9-a de majo 1945, kiam finiĝis la barbara¹ dua mond'milito en Eŭropo, kiu kaŭzis la morton de milio-
noj da sen-kulpaj homoj.

Robert Roĵdestvenskij

REKVIEMO²

Fragmentoj

Nigra ŝtono,
nigra ŝtono,
ĉu vi mutas³,
nigra ŝtono?

Ĉu vi iam volis tion?
Ĉu vi revis iĝi plato
por la tombo de l' soldato,
de l' soldato ne-konato?

Nigra ŝtono.
Ĉu vi mutas,
nigra ŝtono?...

Ĉu vi kulpas, ke la fratoj
kaj la patroj en la tero
dormas pro la sorto-batoj,
dormas longe la soldatoj.
Sen-nomuloj,
nekonatoj...

Aŭskultu!
Parolas ni.
Mortintoj⁴.
Ni.
Aŭskultu!
Parolas ni.
El tie.
El neni'.
Aŭskultu!

Ni forgesis aromon⁵ de l' flor'.
Kiel flustras⁶ hodiaŭ acer^{7/1}?
Kuris for
nia ter'el memor'.
Kia iĝis, en nuno, la ter'?

Ni forgesis pri l' herb' kaj la bero,
ne paŝados ni plu
sur la tero.

Tamen estas terura –
pli terura ol mort' –
sci', ke l' birdoj plu kantas
sen ni!

Ke l' merizoj⁹ dis-floras
sen ni!

Ke la nub' super tero,
kaj sur ter' la rivero
ĉiam kuras al foro,
sen ni!

Viv'ne haltas sur voj',
estas ĝi via sort'.

La komuna por ĉiuj ni – sort'...

Memoru!
Tra jar'cent',
tra tempo-monto,
pri l' soldat'
ne-re-venonto,
memoru!
Pri la hom'
ne plu kantonta,
la gefilojn,
per rakonto,
memorigu!
La memor'
ĉe l' nep'ne ĉesu,
eĉ pranepoj
ne forgesu!

La militon nenigu
kaj malbenu⁸,
hom' de l' tero !
Portu l' revon tra la jaroj,
kaj plenigu ĝin per vivo !
Sed pri l' hom' nerevenonta -
mi petegas vin - memoru !

El la rusa tradukis

Romano Grinŝpan

1. malhorna, besta / 2. malĝoja kanto pri mort-
intoj / 3. silentas / 4. tiuj, kiuj mortis / 5. ag-
rabla odoro / 6. parolas apenaŭ aŭdeble / 7. ar-
bo'speco / 8. beni; voki al Dio, por bon - vola
inter-veno / 9. acid'cerizoj.

PROVERBOJ

Kiu mensogis¹ per unu vorto,
ne trovos kredon ĝis la morto.

Nenia peketo² restas longe sek-
reto.

Hodiaŭ forto, morgaŭ morto.

Kiu semas venton, rikoltas³ fu-
lmo-tondron⁴

Fiereco⁵ venas antaŭ la falo.

Plej danĝera malsano estas
manko de saĝo.

1. diris malveron / 2. kulpo, eraro / 3. kolektas
fruktojn / 4. ĉiela bruo kun fulmoj / 5. tro gran-
da mem-fido.

Sur la titol'paĝo: japana parko



Laŭ tradicio¹, la unua ĵaŭdo post la 18-a de aprilo (tio estas: inter la 19-a kaj 25-a de aprilo), estis kaj ankoraŭ estas nomata² *la unua somer'tago* en Islando. Tiu ĉi tago estas ĝenerala ferio³-tago en tiu norda lando; sed, antaŭ ĉio, ĝi estas la tago de la infanoj, kiuj, per gajaj procesioj⁴ kaj diversaj amuzaĵoj, pri-festas la venkon de la somero kaj de la lumo super la vintro kaj mallumo.

En la sekvanta soneto⁵, mi provas esprimi la atmosferon⁶ de tiu aparta islanda festo-tago, sam'tempe memorante pri mia unua infano, kiu nun estas 20-jara, sed kiun mi sia-tempe kondukis per la mano, en tia festa procesio, antaŭ multaj jaroj.

Baldur Ragnarsson

LA UNUA SOMERTAGO 1974

*L' unua somertago, Aprilo dudek-kvina,
foj'foje malvarmeta, kun flirtaj⁷ neĝo-eroj,
sed ofte ankaŭ brila de suno ter'patrina
kaj floroj ek-burĝonaj⁸ post vintraj frost'suferoj;*

*sub flagoj alt'levitaj en kor'jubil⁹, sen-tima,
la stratojn tra-paŝante, kun kantoj de esperoj,
la infanar' islanda, al tago vintro-fina,
ek-levas siajn sentojn en ĉiuj ek-someroj.*

*Somer'! Mi vin salutas en tia akompan¹⁰,
en mezo de la bunta¹¹, ĝoj'plena procesio,
kun vi, geknaboj miaj ok-jaraj, ĉe la man' ;*

*kaj mia penso vagas¹² al blua diafan¹³
de tia tago fora, de sama tradicio,
sed kun alia mano en mia — via man' . . .*

1. kutimo de popolo/ 2. kion oni nomas/ 3. liber'tempo/ 4. pli-malpli bon'orda marŝado de homoj, kun la sama celo/ 5. poemo aŭ versaĵo el 14 versoj kun certa ordo de vers'finaj kun-sonoj/ 6. ĉi tie: humoro de la festantoj/ 7. malpeze fluganta/ 8. estantaj antaŭ ek-floro/ 9. ĝoj(eg)o/ 10. kun-irado/ 11. mult'kolora/ 12. iradas foren/ 13. tra-laso de lumo.

A stylized logo of the Japanese flag, consisting of a red circle on a white background, enclosed in a black rectangular border. The word "Japanio" is written in a large, bold, black sans-serif font, with the red circle of the flag acting as the letter 'J'.

Japanio

MALNOVA KAJ NOVA LANDO
NEKONATA¹ KAJ KONATA LANDO



Maljunaj avoj kaj avinoj kreas, ke iu dio faris insularon en la Orienta maro, kaj ke liaj pra-nepoj venis malsupren al ĝi, antaŭ ne-kalkuleblaj jar'miloj. Kaj ke *poste*, antaŭ 2600 jaroj, la filo de la ĉef'dio fondis Japanion; ke li *mem* fariĝis ĝia tenno (tio estas: ĝia reĝo), kiun sekvis liaj filoj, nepoj, parencoj; kaj ke la *nuna* tenno estas la 124-a en la vico.

Tamen, en la lernejo, nun-tempe la geknaboj lernas de siaj instruistoj, ke la arko-forma insularo iam apartiĝis dis-de la Azia kontinento, pro trans-movo de la ter'fundo, en pra-historia tempo; kaj ke unu tri-ono de la japana popolo venis el nordo, alia triono venis el sudo, kaj la tria triono estis indiĝenoj². Tio estas kred-ebla. Per tio, oni povas klarigi, ke, en mia patrio, mult'specaj kulturoj harmonie³ kun-ekzistas.

La itala vojaĝisto *Marco* (:mar-ko) *Polo* (1254—1323) raportis, en sia verko, ke Japanio estas lando abunda⁴ je oro. Sed tio estis nur



Monto Fuji

lia imago kaj supozo⁵. Japanio estas ordinara lando kun ordinaraĵoj loĝantoj.

Japanio konsistas el kvar ĉefaj insuloj (*Hokkaido*, *Honsu*, *Sikoku*, *Kjuŝu*) kaj el multaj insuletoj. La lando estas 369 560 km² (= kvadratajn kilometrojn) vasta.

Iuj opinias, ke Japanio formiĝis el vulkanoj⁶ en la fundo de la maro. Ĉu pro *tio*, ĉu pro io *alia*, Japanio havas multajn vulkanojn. Monto *Fuji* estas belega vulkano kaj la simbolo⁷ de mia lando.


Japanio estas longa je 3300 km, kaj etendiĝas⁸ de nord'oriento al sud'okcidento, de la frosta ter'zono ĝis la varmega terzono; sekve, abunde kreskas kaj vivas, ĉe ni, diversaj floroj kaj fruktoj, kune kun insektoj, birdoj kaj aliaj bestoj. La ĉerizo-floro estas nia nacia floro, kaj la papilio *kuroageha* estas nia nacia papilio.

La nombro de la loĝantoj nun estas pli ol 100 milionoj; la loĝateco¹⁰ estas, do, pli ol iom densa: 286 homoj sur ĉiu km²!

Tokio estas la ĉef'urbo kun 10 milionoj da loĝantoj. Ĝi akceptis la Olimpikon¹¹ en la jaro 1964, kaj la 50-an Universalan¹² Kongreson de Esperanto. En 1972, la Vintra Olimpiko estis en *Sapporo*.

Antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj, oni modernigis, ĉe ni, la tutan vivon. Multaj homoj vojaĝas, nuntempe, el Japanio kaj al Japanio. Oni aranĝas ĉiu-specajn sportajn matĉojn¹³ naciajn kaj internaciajn: flugo-pilko, gimnastiko¹⁴, ĵudo¹⁵ kaj aliaj. Niaj mekanikaj¹⁶ varoj, ekzemple fotiloj, radio-aparatoj, televidiloj, horloĝoj, aŭtomobiloj k.t.p., estas bonegaj kaj malmulte-kostaj.

En niaj lernejoj, oni instruas



Osaka



Geedziĝo

ĉiujn geknabojn sen-page. Ekzistas multaj universitatoj.

Japanoj uzas literojn tri-specajn: rekta-linia *katakana*, kurba-linia *hirakana*, kaj ĉin'devena *kan-zi*. Ili estas tute malsimilaj al la Eŭropaj literoj. Kun ali'landanoj ni komunikigaŝ¹⁷ ĉefe en la angla lingvo; sed, por egaleco, ni multe bezonus Esperanton.

La japanaj virinoj portas, ĉe festoj, ĉarman veston: *kimono*.

En la jaro 1945, du japanaj ur-

boj estis detruitaj¹⁸ per atom'bomboj. De post tiam, japanoj faras ĉion eblan, por for-igi nukleajn armilojn el la mondo.

La mon'unuo de Japanio estas: *eno*. Afranko de bild'karto ĝis Hungario, kostas 30 enojn per ŝipa poŝto, kaj 55 enojn per aero-poŝto.

Skribu al mi, karaj legantoj de Juna Amiko! Mi nepre respondos per bela japana bildkarto.

S-ro Okumura-Rinzo (Japanio)

1. tio, kion oni ne konas/ 2. pra-loĝantoj de iu lando/ 3. en agrabla unueco/
4. tre riĉa je io/ 5. opinio sen pruvo/ 6. fajro-monto/ 7. io videbla, kio vekas en ĉiu homo la saman penson kaj senton/ 8. okupas longan spacon/
9. insekto kun kvar mult'koloraj flugiloj/ 10. rilato inter la ter'spaco kaj nombro de la loĝantoj/ 11. internacia sport'arango en multaj sport'branĉoj post ĉiu 4-a jaro/ 12. tut'monda/ 13. sporta konkurso/ 14. arto pri belaj korpaj ekzercoj/ 15. japana lukto, tio estas korpo-batalo inter du personoj/
16. rilataj al maŝinoj kaj aparatoj/ 17. interrilatas/ 18. kiujn oni neniigas.

ĈU MURDISTO¹?

ANEKDOTO²

Iu homo *tre* rapide kuris preter *Sokrato*, la fama greka saĝulo. Armita³ policisto persekutis⁴ la kuranton.

„Haltigu lin! Haltigu lin!” kriis la policisto.

Sed Sokrato *ne* faris tion.

„Ĉu vi estas *surda*⁵?” demandis la armita viro. „Kial vi ne baris la vojon al la *murdisto*?”

„Murdisto? *Kio* estas tio?” demandis Sokrato *sia*-flanke.

„Kia demando! *Murdisto* estas homo, kiu mortigas”, klarigis la viro.

„Ha, do: *buĉisto*⁶”, diris Sokrato.

„Malsaĝulo! *Murdisto* estas homo, kiu mortigas *ne beston*, sed *homon*”, plu-klarigis la alia.

„Ho tiel . . . ! Do: *soldato*”, daŭrigis Sokrato.

„*Stulta*⁷ kapo!” ekkriis la policisto. „Tio estas viro, kiu mortigas homon *dum paco*!”



„Ej, nun mi komprenas. Vi parolas pri *ekzekutisto*⁸”

„*Azeno*⁹! — Homo, kiu mortigas homon *en ties domo*!”

„Ho, nun mi estas certa. Tio estas *kuracisto*!” fine diris Sokrato.

Tiam la armito, blasfemante¹⁰, kuregis plu.

1. homo, kiu mortigas homojn por ricevi monon aŭ pro malamo/ 2. pli-malpli kredebla rakonto pri fama persono/ 3. kiu portas batalilon/ 4. ĉasis homon por kapti kaj puni/ 5. kiu ne povas aŭdi/ 6. homo, kiu mortigas bestojn kaj pretigas viandon/ 7. malsaĝa/ 8. homo, kiu mortigas homon post decido de juĝistoj/ 9. long'orela ŝarg'besto; besto de malsaĝeco/ 10. dirante fi-vortojn.

Vortoj, kiuj de-venas de propraj nomoj

En Esperanto, ekzistas amaso da vortoj, en kiuj kaŝiĝas la nomo de persono, de lando aŭ de urbo. Tio havas, kompreneble, historiajn kaŭzojn.

La sekvaj ekzemploj estas nur malgranda kolekto el la granda provizo¹ da tiaj vortoj.

AKADEMIO: La placo, sur kiu *Platono* instruis siajn lernantojn, havis la nomon „*Akademia*”, laŭ la antikva² heroo *Akademos*.

CARO: La nomo de la politikisto *Caius Julius Caesar* en la antikva Romo transformiĝis, en diversaj lingvoj, al *car*, *Kaiser* kaj aliaj. Cetere, *Caesar* estis nur lia kromnomo, kaj ĝi signifas „kalvulo³”.

DRAKONA: La Atena leĝo-donanto *Drakon*, en 621 antaŭ Kristo, en-kondukis leĝaron, pri kiu oni diris, ke ĝi estis „skribita per sangon”.

NIKOTINO: La franca diplomato⁴ *Jean Nicot* (:jan nico) kunportis en 1560 tabakon el Portugalio al Parizo, kaj li rekomendis⁵ ĝin kiel kuracilon.

PERSIKO: La hejm-lando de tiu bon-gusta frukto estas *Persio*.

Fine, jen du vortoj, kiuj formiĝis en nia lingvo:

ESPERANTO: La pseŭdo-nomo⁶ de doktoro *L. L. Zamenhof*.

KABEL: *Kabe* (de *Kazimierz Bein*), fama verkisto kaj tradukisto en la unuaj tempoj de Esperanto. Li subite for-lasis nian lingvon, kaj re-venis al ĝi nur en la lastaj jaroj de sia vivo. De tiam, kiam talenta⁷ homo fariĝas malaktiva⁸, oni diras: li/ŝi kabeis.

1. kolekto da uzeblaj varoj; ĉi tie: da vortoj/
2. pra-tempa/ 3. viro sen kap'hararo/ 4. ŝtata politikisto en ekster-lando/ 5. proponis uzi/ 6. kaŝ'nomo/ 7. saĝa kaj sperta/ 8. ne-laborema, ne-produktema.

ŜERCAJ

lingvaj demandoj

1. El kiom da eroj konsistas eraro?
2. Kie oni trovas maron el roso¹?
3. Kio estas ĉe la postaĵo de ĉiu blankulo?
4. Unu kato miaŭas², du katoj foje ne miaŭas. Kial?
5. La tuto estas birdo, la du-ono — kreskaĵo, kaj ili ambaŭ vivas ĉe lago. Kio estas tio?
6. Kiam pere de homo venas lia propra morto?

1. matena akvero sur herbo/ 2. blekas kiel kato.

SOLVOJ

1. El neniom, ĉar *eraro* ne estas vort'kun-meto.
2. En best'ĝardeno; *temas pri rosmaro*.
3. Kulo (blankulo).
4. *Car dukatoj* estas mono.
5. *Pelikano*.
6. Kiam la akcento en „*perere*” trans-iras al la lasta silabo: *perere* de homo.

MULTAJN AGRABLAJN AVENTUROJN DUM LA SOMERO!!

LA RUBRIKON¹ GVIDAS:

Josef Chvosta (:ĥvosta)

Engelsova 289

290 01 PODEBRADY

Ĉeĥoslovakio

Sendu ĉiun korespondajon

rekte al tiu adreso!



● Karaj klubanoj! Kun granda ĝojo, ni informas vin, ke nia rondo ree largiĝis. Du novaj kluboj al-iĝis antaŭ la 1-a de decembro 1974. Jen estas ilia numero kaj adreso:

KJA/3 Attila Salgó, Olasz út 13, H—3300 EGER, Hungario (19 anoj).

KJA/4 Lyyli Heinanen, Hallusk 13 B 22, SF—50 100 MIKKELI 10, Finnlando (12 anoj).

Ni el-kore gratulas iliajn membrojn kaj deziras al ili multan sukceson en nia rondo!

● Ni atentigas niajn junajn legantojn pri la regularo de KJA, laŭ kiu la nombro de unu-opaj kluboj ne superu 8 personojn. Ni volas esti amikajn rondojn. Malgrandaj grupoj povas pli facile kun-meti, por si, programon. En unu klaso povas funkcii eĉ 3 kluboj. Aliĝ-ontoj² konsideru tion!

● Konkurso por KJA, kaj por ĉiuj legantoj:

Por kontroli ĉion, kion vi lernis dum la lerno-jaro, legu la ĉi-suban rakonton, kaj ĝustigu la erarojn!

Hieraŭ matene, Karolo leviĝis ĉirkaŭ la 19-a horo. Ĉar estis somero, do ankoraŭ estis mallume. Karolo turnis la kranon³, por lumigi la ĉambrom. Li lavis la supran korpo-parton ĝis la genuoj⁴, en malvarma akvo. Poste, li demetis la noktan sub-veston kaj vestis la ĉemizon sur siajn krurojn, kaj la kalsonon sur la bruston.

La matena manĝo jam estis preparita sur la ŝranko. Li trinkis kafenon kun lakto kaj panon kun butero⁵ kaj marmelado⁶. Kiam la 20-a horo proksimiĝis, heliĝis ekstere. La suno bele brilis super la neĝo-kovrita pejzago⁷; nur la flavaj cejanoj⁸, en la proksima kampoj, el-staris el tiu blankeco.

Karolo prenis sian lerno-sakon kun fungoj⁹, kaj iris en la lernejon, kiun li atingis ne-longe post la 20-a horo. Li havis tie 5 lerno-horojn. Post la 5-a lerno-horo, vespere, Karolo iris hejmen, prenis sian biciklon kaj gaje naĝis sur la herbejo.

Sendu la ĝustan rakonton al la supra adreso, antaŭ la 1-a de septembro 1975.

1. parto aŭ angulo en gazeto/ 2. tiuj, kiuj al-iĝos/ 3. fermilo de akvotubo/ 4. certa korpo-parto/ 5. laktajo/ 6. densaĵo el fruktoj/ 7. parto de la naturo/ 8. certa floro-speco/ 9. post-pluva kreskaĵo.

ATANAS D. ATANASOV

*Atanas D. Atanasov aŭ ADA —
kiel mallonge
la tut'monda esperantistaro nomas lin —
estas vic'prezidanto de la
Akademio de Esperanto.
Oni konas lin kiel
el-staran aganton,
organizanton kaj tradukiston.*

Esperanto signifas por mi...

Nun, en la lasta parto de mia vivo, kiam mi direktas mian rigardon sur la tra-iritan vojon, mi povas sincere konfesi¹, ke mi benas la tagon, en kiu mi renkontis Esperanton. Tio estis antaŭ 70 jaroj.

Dum longaj jaroj da agado, mi komprenis klare kaj funde la seriozecon de la problemo de internacia lingvo, ties historian kaj socian bazon.² Esperanto aperis, antaŭ mi, ne kiel hazarda ek-ideo de unu sola persono, sed kiel natura solvo de grava socia problemo. Ĝi estis kreita de historiaj cirkonstancoj³. La sen-ĉesa pli-multiĝo de komunikoj⁴ inter la popoloj ne-eviteble trudis⁵ la neceson serĉi naturan kaj racian lingvan rimedon⁶, por for-igi la barojn sur la vojo de la homara progreso.

La esenco⁷ de la ĝenerala problemo pri la Internacia Lingvo ĉiam okupis min. Ĝi estis objekto de miaj pri-pensoj kaj konsideroj. Mi vidis, ke la mult'lingveco — tiu obstaklo⁸ por normalaj inter-popolaj kaj inter-homaj komunikoj — estas tamen avantaĝa⁹ por iuj grandaj ŝtatoj, celantaj trudi sian lingvon en la internacia vivo. Per siaj lingvoj, ili celas al monda hegemonio¹⁰. Tio ŝokis¹¹ miajn demokratajn sentojn.

Nur la Internacia Lingvo povas kuraci la lingvajn malsanojn de nia moderna epoko.

*Atanas D. Atanasov
Sofio, la 5-an de novembro 1974.*

1. malkaŝi sincere/ 2. tio, sur kio oni konstruas/ 3. aro da kondiĉoj/ 4. interŝanĝado de informoj/ 5. dev'igis, akcept'igis/ 6. tio, kio servas por atingi celon/ 7. ĉefa aĵo/ 8. baro, malhelpaĵo/ 9. avantaĝo: tio, kio donas superecon, utilon/ 10. super-regado/ 11. tranĉi la sentojn.

enigmo

Nun vi trovas el-tondaĵojn el diverslingvaj presafaĵoj (araba, bulgara, finna, hebrea, itala, japana, rusa). Via tasko estas: al-doni al la numeroj de la eltondaĵoj, la lingvon, el kiu ĝi estas prenita.

Sendu la solvon al s-ro D. Berndt, Berolinastr. 2., DDR-102 BERLIN, antaŭ la 1-a de septembro 1975. Premie ni dis-donos unu-jaran abonon al *Juna Amiko*. Ne preter-lasu la okazon!

1. рясений пока гораздо больше южнее, ближе к афганской границе живут люди, выстроены города. Возможна ли там катастрофа?

2. Kun joulu lähestyy, puksi toivottaa Teille nimmistä vanhimpaa puolestani rauhallista

3. قادة الاوركسترا الشباب وقع اتفاق ومن وجهة النظر هذه كانت المسابقة قادة الاوركسترا الشباب وحافزا

5. quale gioia mi avesse accolto. Avevo trascurato così a lungo, che non era colpa mia se non

6. Любима, пленителна зима! Дървета и поля са покрити блестящо бяла снежна покривка.

7. אין אפריקן צטרײט צו דער אין דער ליטעראטור פון אידען אין אום וויכטיגען ענין דאָס

4. と四か月はかりとなったて諸君のなすべきことは、つてムラなく基本事項を

Ĉiu scias, ke la abeloj estas diligentaj kaj labor-emaj, kaj ke ili produktas, por ni, la bon'gustan mielon, utilan por la sano. Sed nur malmultaj scias, ke abeloj iam ankaŭ milit'servis al la homoj.



Kiam la rajdistoj¹ el Lorraine (:loren') kur'atakis la armeon² de la franca reĝo Henriko la IV-a, la ĉefgeneralo³ ordonis el-lasi abelojn kontraŭ la atakantaj ĉevaloj. Tiam timego ek-regis la ĉevalojn, kaj la atako fiaskis⁴.
Rihardo, nomita Leon'koro, iam okupis fortikaĵon⁵ en la

ABELOJ SUR BATAL'KAMPOJ



sama maniero. Li ordonis kolekti laŭ-eble multajn abelujojn; poste, soldatoj devis el-flugigi la abelojn al la soldatoj, kiuj defendis la fortikaĵon. Por eviti la pikilojn de la koleraj abeloj, la soldatoj kure for-lasis sian postenon⁶, kaj kaŝis sin en la keloj⁷.

Kiam ili re-konsciigis, la militistoj de Rihardo jam okupis la fortikaĵon.
Ankaŭ en la postaj tempoj, oni uzis abelojn en milito. En la unua mond'milito, ekzemple, germana divizio⁸ en Orienta Afriko, ĵetis, dum batalo abelojn kontraŭ anglaj soldatoj.



Karlo perdis sian ĉapelon



LUDO POR LERNI
AKUZATIVON¹

Ĉiuj ludantoj ricevu iun nomon, ekzemple tiun de bestoj: Hundo, Kato, Lupo...

Tiam, la gvidanto de la ludo diras:
„Karlo perdis sian ĉapelon.

Kiu havas ĝin? Ĉu Kato havas ĝin?”

Kato tuj respondas:

„Kato ne havas ĝin. Koko ĝin havas.” (Se la nomon „Koko” elektis neniu, Kato devas doni garantiaĵon².)

Tiam Koko devas tuj respondi: „Koko ne havas ĝin. Vulpo ĝin havas.”

Tiu, kiu ne respondas tuj, estas kulpa, kaj devas doni garantiaĵon. (Ludanto, kiu du-foje diras la saman nomon, donas garantiaĵon.

Anstataŭ „havas”, oni povas uzi „trovis” aŭ „ŝtelis” aŭ „kaŝis” k.t.p.

Fine de la ludo, la gvidanto kovras la garantiaĵojn kaj demandas:

„Kion faru la kulpulo, kies garantiaĵon mi tenas en la mano?” La ludantoj mem decidas, kaj el-aĉetas siajn garantiaĵojn per kantoj, versaĵoj k.t.p.

S-ino G. Ōsz (:oes)

1. o-vorto kun la finaĵo n/ 2. objekto, kiun oni trans-donas al iu.



KASTORA LETERO

De J. H. SULLIVAN

Miaj karaj Kastoroj!

Al-venis la printempo, kaj vi jam, certe, antaŭ-ĝuas la someron. Eble, vi jam faris viajn planojn — aŭ konas la planojn de viaj gepatroj — por someraj ferioj.¹

Cu vi volas esti tre afabla al mi? Skribu al mi pri viaj ferioj! Mi ĉiam estas feliĉa ricevi leterojn de miaj Kastoroj; kaj, krom tio, mi estas certa, ke viaj spertoj (kiom ajn ordinaraj al vi mem) povas esti tre interesaj al ali'landaj legantoj, kiuj pasigas la feriojn en aliaj manieroj.

Kaj se vi, bedaŭrinde, ne for-iros ferii, skribu al mi ion pri via ĉiu-taga vivo. Eĉ tio, certe, estas malsama ol la ĉiutaga vivo en diversaj aliaj landoj.

Ciu-okaze, mi sendas al vi ĉiuj miajn korajn salutojn kaj sincerajn bon'dezirojn por la somero.

Nun mi havas, por vi, rakonton pri granda itala skulptisto.²

LA KRUCIFIKSO³ DE DONATELLO

Donatello, unu el la plej bonaj skulptistoj de sia tempo, faris multajn skulptaĵojn, inter kiuj la statuoj⁴ de S-ta (=sankta) Mikaelo, de Davido kaj de S-ta Georgo estas la plej el-staraj.

Donatello estis ankoraŭ junulo, kiam li skulptis krucifikson el ligno por la preĝejo de la S-ta Kruco en Florenco. Ĉar li kredis, ke li faris belajn, li montris ĝin al sia amiko Brunelleschi (:brunleski; granda skulptisto kaj arkitekto⁵), por ricevi ties opinion. Ĉi tiu, kiu esperis vidi ion pli bonan, ridetis kaj diris sen-kaŝe: „Sajnas al mi, ke vi metis sur la krucon kamparanon, kaj ne Kriston.”

Donatello, kiu atendis laŭdon, respondis kolere: „Se vi kredas, ke estas facile fari Kriston, prenu pecon de ligno, kaj penu vi mem fari ĝin!”

Brunelleschi ne respondis, sed iris hejmen, kaj tuj komencis fari krucifikson, kiu estis vera bel'artaĵo. Kiam li finis ĝin, li iris inviti Donatellon vesper'manĝi kun li. Survoje li aĉetis ovojn kaj salaton por la vespera manĝo. Poste, li donis ilin al la amiko, kaj diris: „Portu ĉi tiujn manĝaĵojn al mia hejmo, kaj atendu min tie. Mi tuj sekvos vin.”

Donatello faris tion. Kiam li eniris la domon, li tuj ek-vidis la krucifikson de Brunelleschi, kaj li tiom forte miris, vidante tiel perfektan laboraĵon, ke li malfermis la manojn, kaj lasis fali la ovojn kaj salaton. En tiu momento, Brunelleschi alvenis kaj ridis pri tio. Donatello turnis sin al li, kaj diris: „Al vi estas donite fari Kristojn, al mi — fari kamparanojn.”

Kaj de tiam, ili fariĝis eĉ pli bonaj amikoj ol antaŭe.

NIAJ PROMOCIITOJ⁶

Bedaŭrinde, neniu el niaj membroj atingis pli altan gradon inter la fino de julio (kiam mi devis verki la lastan Kastoran Leteron), kaj la fino de novembro, kiam mi verkas la nunan. Mi ne dubas⁷, ke tio estas pro la somera liber'tempo, kaj pro la fakto, ke, ĝis no-

vembro, ne estis sufiĉe da tempo en la nova lerno-jaro. Tamen, nia Klubo ne restis sen-mova dum tiu tempo, ĉar ni gajnis 23 novajn membrojn!

Adreso de nia organizaĵo estas:
3 Berwick Avenue, Urmston,
MANCHESTER, M31 1PS, *Anglio*.

LETERO AL LA REDAKTISTO



*F-ino
Barbara
Domańska*

Antaŭ kelkaj tagoj trafis la redaktejono de Juna Amiko letero de *f-ino Barbara Domańska*, polino, la unua Ora Kastoro. Vi trovas, ĉi-sube, kelkajn liniojn el ŝia afabla letero:

„Hodiaŭ, mi tra-rigardis mian tutan korespondadon; kaj mi konstatis, ke mi ricevis de la Ĉefa Kastoro ĉirkaŭ unu kilogramon da skribaĵoj... La 1-a Kastora Letero aperis en aprilo 1965. la 2-a: en junio 1965, kaj ĵus mi ricevis la 30-an... Mi iĝis Kastoreto la 13-an de majo 1965. De tiam — kvankam mi jam vizitas universitaton — mi estas fidela ano de la Klubo, kaj ĉiam ankoraŭ ĝojas, ricevante sciigon de la Ĉefa Kastoro.”

„Kun granda ĝojo, mi legas, ke la nombro de la Brunaj, Arĝentaj kaj Oraj Kastoroj pli-grandigas. Mi kore gratulas al la Ĉefa Kastoro, s-ro J. H. Sullivan, kiu tre interese gvidas la Klubon.”

Al la 10-jara jubileo⁸ de la fondiĝo de la KASTORA KLUBO DE ESPERANTO, la tuta redaktistaro de Juna Amiko deziras pluan sukceson kaj, aparte, al s-ro J. H. Sullivan (:salivn), ni deziras fortan sanon kaj daŭran energion! Ni el-kore dankas al li pro lia nobla kaj sen-laca laboro.

La redaktistaro

1. liber'tempaj tagoj/ 2. skulpti: arte tranĉi ŝtonon, lingon aŭ alian materion/ 3. kruco kun la formo de Kristo sur ĝi/ 4. formo de homo el ŝtono, metalo aŭ ligno/ 5. fakulo pri konstru'arto/ 6. tiuj, kiuj altiĝis en rango/ 7. ne kredas, ne estas certa/ 8. festo okaze de dat'reveno.

kiel ni mortigadis
leporon por la
antaŭ-kristnaska
vespera manĝo



III. POST-SEKVO DE ĈASADO

Laŭ „Paŝoj al plena posedo” de W. Auld

Jen, kiel unu-nura besto malgranda povas detrui la trankvilon de *tuta* familio! La patro for-estas; la patrino ploras en la kuirejo; kaj la avineto prelegas² al la kvar nudaj muroj pri tio, kion ŝi konsilis, sed neniu atentis ŝin.

Inter-tempe, la aveto kaj la fratino Fabiano re-konsciigis, sed tro malfrue. Ili fariĝis atestantoj nur de la malglora fino de la batalo. Por mildigi la pezan familian atmosferon, Fabiano komencis elakvigi fiŝetojn el la akvario de la patro — laŭdire por la Kristnaska vespera manĝo. Pro tiu malsaĝa ago, la aveto juĝisto kondamnis lin al bato-puno; kaj liaj vortoj tuj plenumiĝis. Tiam, la avino donis al la plenumanto la nomon „maljuna kanajlo³” — ĉar kulpas ne la knabo, sed la malbona *edukmaniero*. Per tio, ŝi malŝargis sian koron, kaj for-iris al la noktomeza meso, dum la aveto iris en gastejon.

Ciuj foriris; kaj... ĉu *mi sola* restu hejme? Ankaŭ mi for-lasis

la nasko-domon, por partopreni en nia antaŭ-kristnaska ludo. Sciuj, ke estis en nia urbo iu german'devena policano, iom mokinda. Li nomiĝis Frideriko Frits, sed ni nomis lin nur „Zweimal Frits” (germana vorto „zweimal” signifas: du-oble). Ju pli li estis ridinda, des pli li volis esti severa. Precipe, li zorgis pri nokta trankvilo. Li paŝis tra la stratoj, ĉiu-vespere post la 10-a horo, antaŭkristnaske post la noktomezo; kaj li atentis, ke neniu faru bruon, kaj ke ĉiuj sur-stratuloj iru hejmen en ordo.

Mi el-kuris el la domo; kaj... *kion* mi vidas? Zweimal Frits pelas tra la strato nian leporon! Renversita mondo! Leporoj kuras tra la stratoj! Ĉu li, la ŝtata oficisto, povas *toleri* tion? Li *devas* el-peli la beston el la urbo. Alimaniere, *kion* dirus liaj superuloj al li??

La leporo kuras sur la trotuaro, zigzagante. La policano ne laciĝas; sed... kapti ĝin? Estas

sen-sencaĵo! Kontraŭ ili al-paŝas avo, kun bastono en la mano. La leporo kuras sub liajn piedojn; la maljunulo perdas la egal'pezon, ek-falas kaj, kontraŭ-vole, li svingas¹ la bastonon, kiu trovas, kiel celon, la polican kaskon⁵, kaj sur-kapigas ĝin, al Zweimal Frits, ĝis la oreloj... La leporo venkis kaj, fine, atingis la arbaro-randon.

Zweimal Frits ver'simile vidis antaŭe, ke la leporo elkuris el nia domo; kaj, certe, nia najbar-

ino volonte sciigis al li, al kiu apartenis la leporo; alimaniere, mi *ne* scias klarigi al mi, kial, en la sekva tago, du policistoj ek-frapis *ĝuste* je *nia* pordo. La patro el-ĵetis ilin, insultis la najbarinon, kaj el-trinkis la reston el la likvoro-botelo. Poste, lia rimeno⁶ ek-dancis sur certa korp parto de la frato Fabiano, por memorigi al *li*, ke alkoholaĵo *ne* estas taŭga trinkaĵo por infanoj... Kaj, kvankam mi eltrinkis nenion el la botelo, ankaŭ *mi* havis la okazon gajni similajn spertojn...

Necesas aldoni, ke oni juĝas la patron, pro ofendo de ŝtata oficisto, kaj ke li devos aĉeti novan kaskon por la policano Zweimal Frits. La patrino sen-ĉese ploras. La avineto for-loĝiĝis. La aveto pasigas la tutajn tagojn en gastejo. La frato Fabiano forkuris el la hejmo, kaj mi malsukcesos en la ekzameno pri natur'scienco. Krome, oni klasifikos miajn morojn kiel malkontentigajn, ĉar mi, ŝajne estas aroganta. Tion la instruisto diris al mi; ĉar pri lia demando, kion mi scias pri la leporo, mi respondis: „nenion”.

FINO

Vladimír Vána (:vanja)

1. rapid'kura besto kun longaj oreloj/ 2. instrue parolas/ 3. fi-homo/ 4. rapide kaj larĝe movas/ 5. ĉapelo el metalo/ 6. forta zono por teni viran pantalonon.






TRAGEDIO en la 3. UNIVERSO

VERKIS: JUŅAJ ZAGREBAJ ASTRONOMOJ³
DESEGNIS: Z.VAMOS (VAMOŠ)


TRI ASTRONAŬTOJ⁴ (ASTRONOMO⁵, BIOLOGO⁶, GEOLOGO⁶) LOĜANTOJ DE LA PLANE DO⁷ RACIO⁸, EN LA SISTEMO⁸ DE LA STELO ALFA CENTAŬRI, POST LONGA SPAC⁹VETURO, VENIS AL LA TERO.



VI MEM ESTAS PERFIDULOJ.
VI PERFIDAS LA HOMARON,
DO ANKAŬ LA PATRION!


MORTO. PRO PERFIDO
AL LA PATRIO

SCIIGO DE LA RADAR OBSERVEJO:
ALMENAŬ 2000 RAKETOJ FLUGAS
AL NIA LANDLIMO.




KANTU!


Versoj de L. Bojaĝieva
Muziko de V. Heimlich (:hajmliĥ)
Al la arbaro ...




1. Al la ar-ba-ro, al la her-ba-ro,
2. En la ar-ba-ro, sur la her-ba-ro,
3. De la ar-ba-ro, de la her-ba-ro,




kun la a-mi-koj el - i - ru!
kun la a-mi-koj sat - lu - du!
kun la a-mi-koj re - i - ru!




Ti - e, ku-ran-te ga-je kaj kan-te
Ti - e, ŝer-can-te ĝo-je kaj kan-te
En la tor-nis-troj³ ki-el tu-ris-toj⁴



tem-pon fe-li-ĉan pa - si - gu!
bonan hu-mo-ron vi sen - tos,
fungojn⁵ bon'gustajn kun - por - tu!



Fre-ŝa a - e-ro, ĝis la ves-pe-ro
La ru-ĝaj fra-goj¹; sub la kra-ta-goj²
Ri-du el-ko-re, kan-tu so-no-re,



per la ka-res⁶, vin ĝo-ji-gos. -ji-gos.
nur for-manĝon a - ten-das. -ten-das.
pri l' a-mi-ke-co ra-kon-tu! -kon-tu!

TRAGEDIO EN LA UNIVERSO

1. tre malĝojiga okaz-aĵo/ 2. la sen-fina spaco/ 3. scienculoj pri la steloj/ 4. veturantoj en la spaco/ 5. scienculo pri vivaj estaĵoj/ 6. scienculo pri ĉiel'korpoj/ 7. ĉielkorpo kiel la Tero/ 8. ĉi tie; aro da planedoj ĉirkaŭ stelo/ 9. tragedio, malĝojiga okaz-aĵo/ 10. malĝoja, ploriga/ 11. eksperimento: sciencia provo/ 12. kobalta bombo; super-forta eksplodaĵo/ 13. el-paf-ejo.

KANTU!

1. ruĝaj dolĉaj beroj koro-formaj/ 2. arbo-speco/ 3. dorso-sako de ekskursanto/ 4. ekskursanto kun plezura celo/ 5. post-pluva ĉapelo-hava kreskaĵo.

HUMORO

1. la plej alta sporta atingo/ 2. pan'kuko/ 3. hungara mon'unuo/ 4. cent-ono de forinto.

ABONU

KAJ VARBU
ABONANTOJN
AL LA 3-A
JAR'KOLEKTO
DE
JUNA AMIKO
(3 NUMEROJ!)
LA 1-A NUMERO
APEROS EN
SEPTEMBRO 1975.

ABSOLUTA SPORTISTO

Sportisto kuŝis mal-sana. Li havis febron.

Kuracisto mezuris al li la temperaturon kaj diris:

„Oj! 39!”

„Kaj... kiel alta estas la monda rekordo?” demandis la malsanulo.



„Kvin bulkoj² kostas 2 forintojn³. Kiom kostas unu bulko?” demandis la instruisto al Maria.

„40 filerojn⁴!” respondis Maria fulm'rapide.


„Kiel vi el-kalkulis tion tiel rapide?”

„Mi ne kalkulis. Mi ĵus aĉetis unu bulkon.”

„Panjo, kiam mi estos granda, mi estos la edzino de mia avo.”

„Kiel, karulino? Ĉu vi volas esti la edzino de mia patro?”

„Kial ne? Ankaŭ vi estas la edzino de mia patro.”



La 15-a Infana Esperanto-Kongreseto okazos en la sama loko kiel la 1-a

En la kadro de la 60-a Univer-
sala¹ Kongreso de Esperanto (in-
ter la 26-a de julio kaj la 2-a
de aŭgusto), denove kolektiĝos
ankaŭ la infanoj ĝis-14-jaraj. Ili
povos pasigi belan semajnon en
tiu sama loko, kie okazis, sia-
tempe, la 1-a Esperanto-Kongres-
eto, nome en „Bjorns Internatio-
nale Skole og Bornehave”, 2900

HELLERUP, *Danlando* (Internacia
lernejo kaj infan'vartejo de
Bjorn). Ekskursoj, ludoj, amuzaj
programoj igos agrabla la kun-
vivado.

Ankoraŭ ekzistas ebleco al-igi.
Turnu vin baldaŭ al: 60-a Uni-
versala Kongreso de Esperanto;
Postboks 1503, DK—2700 BRONS-
HOJ.


UTILA INSTRU'HELPILO POR KOMENCANTOJ

Aperis, en dua el-dono, valora kaj tre bona verkaĵo de du hungaraj
instruistoj, *s-roj Csorba kaj Mikulás*, sub la titolo: „*Tasko-folioj por
komencantoj, 1-a kajero*”. Ĝi konsistas el 32 grand'formataj² taskofo-
lio, dis-doneblaj po unu. Instruado laŭ tiuj amuzaj folioj rezultigas
preskaŭ plenan for-igon de nacia lingvo-uzo. La taskofolioj servas egale
bone por iu ajn lingvo ĉe iu ajn lernolibro. Ni varme rekomendas³ ilin.
Ĉi-sube vi trovas el-tarnĉaĵon el la 2-a folio.

Hungaroj mendu ilin
ĉe HEA! Prezo: 12 fo-
rintoj.

Ekster-landanoj ri-
cevas la foliaron kon-
traŭ 5 respond'kupo-
noj ĉe la Teritoria Ko-
mitato n-ro 9 de HEA,
Pf. 11. H—5000 SZOL-
NOK, *Hungario*.

1. tut'monda/ 2. larg-
eco kaj longeco de fo-
lio/ 3. proponas uzi.



La elefanto: _____
La kolombo: _____
La tigro: _____
La fiŝo: _____
La ĝirafo: _____
La ĉevalo: _____

Ĉu vi staras nun? Ne, mi ne _____, sed _____.

● Knabino 16-jara deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri muziko kaj insignoj. Adreso: *Olja Nesterenko*, str. Bukovinskaja 39, 340080 DONECK, *Sovetunio*.

● 21 gimnazioj deziras korespondi kun sam'aĝaj gelernantoj el la tuta mondo. Skribu al: *Esperanto-grupo*, Gimnazio Turi György, 8100 VÁRPALOTA, *Hungario*.

● 15-jara lernanto deziras korespondi kun hungaroj. Li interesiĝas pri revuoj, ŝakludo, futbalo, matematiko kaj fiziko. Adreso: *Jacek Majewski*, ul. Senatorska 12, PL 08-400 GAWOLIN, *Pollando*.



● Lernantino 15-jara, kiu kolektas bild'kartojn kaj buŝtukojn, deziras korespondi. Sia adreso: *Éva Szabó*, Erdélyi út 8, 3373 BESENYÓTELEK, *Hungario*.

● Knabino 15-jara deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri insignoj, moneroj kaj muziko. Adreso: *Tanja Košovenko*, str. Artjoma 193, 340004 DONECK, *Sovetunio*.

Gusta solvo de la ENIGMO (n-ro 4) „Forstreku, ne enskribu!”:

LITERATURA MONDO

Unu-jaran abonon al *Juna Amiko* gajnis: *Margarete Kasten*, Erich Weinert Str. 93, DDR—1055 BERLIN. *Szöke Agnes*, Csányi u. 20, H—1203 BUDAPEST. *Stasys Gaidamavicius*, Gorkio—36, bt. 41, SU—232024 VILNIUS.

Ni gratulas ankaŭ al tiuj, kiujn la fortuno, ĉi-foje, ne favoris. Jen estas ilia nomo: *Heike Schüler*, *Ingrid Erfurth*, *Eva Wolf* (GDR); *Igor Maisejev* (Sovetunio); *Sylvie Fort* (Francio); *Miroslav Hromas* (Ĉeĥoslovakio); *Imre Horváth*, *Erzsébet Juhász* (Hungario).

JUNA AMIKO

Sub aŭspicio de ILEI

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H-1368 Budapeŝt 5. Pf. 193.). Respondeca redaktoro JOZEFŐ MATEFFY. Redaktoro: GEZA KURUCZ. Kunlaborantoj: *D. Berndt* (GDR), *M. Boulton* (Anglio), *J. Chvosta* (Ĉeĥoslovakio), *As. Grigorov* (Bulgario), *L. Jevsejeva*, *B. Kärt* (Sovetunio), *U. J. Moritz* (GFR), *R. Okumura* (Japanio), *G. Ōsz* (Hungario), *B. Ragnarsson* (Islando), *Z. Rehorič* (Jugoslavio), *J. H. Sullivan* (Anglio), *M. Turin* (Francio), *J. Zăgoni* (Rumanio). Grafikistoj: *J. Klement* (Ĉeĥoslovakio), *S. Plugor* (Rumanio), *E. Váli*, *Z. Vámos* (Hungario). Lingva revizio: *A. Lienhardt* (Francio), *A. Pechan* (Hungario).

Kiadói Főig. engedély száma: 48125/75

75.189 Dürer Nyomda, Gyula

finom



BUDAPEST
fűszert
fűszert

BUDAPEST
fűszert
fűszert